IpI

Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 34 (kvara serio), numero 4 (133), 2025
ISSN 1385-2191

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ♦ @CED_interling

Redaktas

Başak ARAY ♦ KIMURA **Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ)**
Jorge Antonio LEONI DE LEÓN ♦ **Bengt-Arne** WICKSTRÖM

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

I Eventoj 3

1 La 2-a Simpozio pri konstruitaj lingvoj, 2024 3

II Universitata kaj esplora agado 4

1 UNED – Universidad Nacional de Educación a Distancia en Hispanio ekde 2018 proponas oficialajn diversnivelajn Esperanto-kursojn 4

III Kulturo 5

1 Internacia Esperanto-Arkivo en Diest, Nederlando, ekfunkcias 5

2 Esperanto en amaskomunikiloj 5

IV Personoj 6

V Bibliografiaĵoj 6

1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj 6

2 Fakrevuaj artikoloj 6

3 Libroj 6

4 Libroĉapitroj 7

5 Revu-numeroj 7

5.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 7

5.2 Language Problems and Language Planning 7

5.3 Beletra Almanako 7

5.4 Esperantologio / Esperanto Studies 7

5.5 Investigationes Linguisticae 7

6 Novaĵleteroj **7**
6.1 Global coalition for language rights (GCLR) 7
6.2 Observatoire européen du plurilinguisme (OEP) 7
6.2.1 La lettre d'information de l'OEP, **103**, 2025-07/08. 7

I EVENTOJ

1 La 2-a Simpozio pri konstruitaj lingvoj, 2024

La aktoj de la 2-a Simpozio pri konstruitaj lingvoj (vidu *IpI* **33**:4 (129), p. 83) ĵus publikiĝis lobroforme en la revuo *Ricognizioni*: Vidu Enguehard, Planchon kaj Ray (2025) en la parto Bibliografiaĵoj.

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 UNED – Universidad Nacional de Educación a Distancia en Hispanio ekde 2018 proponas oficialajn diversnivelajn Esperanto-kursojn

Nur unu universitato en la mondo oficiale instruas esperanto malĉeeste: *Universidad Nacional de Educación a Distancia* – UNED. UNED estas «malfermita universitato»: krom instrui malĉeeste (antaŭe perpoŝte, nuntempe perinterrete), ĝi ne postulas regulan vizitadon al lecionoj. Ne necesas havi alt-lernejan diplomon por eniri, nek havi hispanan civitanecon aŭ adreson. Ĝi estas publika nacia universitato rekte dependante de la hispana ministerio de edukado. Kvankam ĝia sidejo troviĝas en Madrido, ĝi havas centrojn en la ĉefurboj de ĉiuj hispanaj provincoj, kie la studentoj povas ekzameniĝi kaj ricevi helpon. Eĉ ekzistas kelkaj tiaj centroj ankaŭ ekster Hispanujo: en Bonaero (Argentino), Karakaso (Venezuelo), Limo (Peruo), Meksikurbo (Meksiko), Bogoto (Kolombio), Kito (Ekvadoro), Santiago (Ĉilio), Sanpaŭlo (Brazilo), Novjorko kaj Seatlo (Usono), Malabo (Ekvatora Gvineo), Lisbono kaj Porto (Portugalujo), Londono (Britujo), Parizo (Francujo), Bruselo (Belgujo), Berlino, Frankfurto kaj Munkeno (Germanujo), Berno (Svisujo), Romo (Italujo) kaj Varsovio (Polujo).

UNED instruas 16 lingvojn, de la ĉina ĝis la hispana signo-lingvo, kaj de 2018 ankaŭ Esperanton, laŭ interkonsento kun Hispana Esperanto-Federacio. La unua kurso havas nivelon $A2$ laŭ la Komuna eŭropa referenckadro por lingvoj, sed taŭgas por hispanlingvaj komencantoj, komenciĝante de tre baza nivelo. De 2020 estas instruata ankaŭ kurso por progresantoj je la nivelo $B1$, kaj en oktobro 2025 komenciĝos la kurso $B2$. Tiuj du kursoj estas tute en Esperanto.

Lingvolernado en UNED sekvas la tradicion de per-poŝta instruado: la studentoj rajtas eniri ĝian retejon kiam ajn ili volas aŭ povas. Ili lernas per tekstoj, son-registraĵoj, ekzercoj, klarigoj, kaj aliaj rimedoj. Tial, studentoj devas studi plejparte sen helpo kaj instigo de instruisto; tio postulas aktivan interesiĝon kaj kapablon mem organizi sian studadon. Avantaĝo estas, ke studentoj mem decidas, kiel rapide ili volas sekvi la kurson, kaj ili faras tion en horo konvena por ili. Krome, eblas konsulti la instruistojn por ricevi klarigojn pri duboj kaj malfacilaĵoj. Ankaŭ interrilatado kun aliaj studentoj estas grava parto de lernado, kaj eblas fari tion per diskutgrupoj kaj retpoŝto. Studentoj povas ankaŭ partopreni unu/du kunsidojn monate por konversacio kun instruisto kaj aliaj studentoj. Tiel ili ekzercas sin pri parolado.

La kursoj estas oficialaj, kaj necesas registriĝi same kiel por aliaj lingvoj. La prezo estas sama, la instruistoj estas pagataj profesiuloj, kaj la sukcesintaj studentoj ricevas diplomon post ekzameno. Eblas ankaŭ ekzameniĝi kaj ricevi diplomon, eĉ se oni ne partoprenis la kursojn. Por ricevi pliajn informojn, kontaktu la kunordiganton Félix Lobo.

Rubeno Fernández, (Iom mallongigita kaj redaktita teksto de uea.facila, redaktoro: Anna Lowenstein)

III KULTURO

1 Internacia Esperanto-Arkivo en Diest, Nederlando, ekfunkcias

La arkivejo en Diest, aĉetita en 2024, nun plene funkcias. La arkivaĵoj ĉiuj estas surlokaj, orde aranĝitaj kaj sekuraj kontraŭ polvo, humido kaj temperaturvariado. La volontuloj havas ekipitajn laborlokojn kaj aldone funkcias prelegejo kaj kunvenejo. Ni instalis ne nur la ejon mem, ankaŭ la arkivo mem evoluas. Pluraj personaj kaj asociaj arkivoj alvenis kaj la katalogoj kreskas. Tiel ni enkatalogigis la deksesmilan libron, la milan revutitolon (kun dektrimil revujaroj) kaj la unuajn sepmil dokumentojn kaj dumil objektojn.

IEspA aperigis Esperanton en la retejo pri nemateria heredaĵo ĉi tie kaj ĉi tie. Tio estas la unua paŝo al akceptado de Esperanto kiel nemateria heredaĵo en Flandrujo, mem paŝo al UNESCO-rekono. Ankaŭ la centra organizaĵo «Archiefpunt» (arkiva centro) informas pri Esperanto kaj IEspA.

Ĉiu bonvenas ĉe IEspA – post interkonsento – ĉe Hasseltsestraat 26, NL-3290 Diest. Bonvenon!

Marc Vanden Bempt (Teksto iom redaktita kaj mallongigita)

2 Esperanto en amaskomunikiloj

Por la dokumentado de artikoloj pri Esperanto kreiĝis la retpaĝo Esperanto en amaskomunikiloj en la vikio de UEA kun la celo havi iom da kompreno, kio entute aperas pri Esperanto. Ĉiu rajtas meti mencion pri artikoloj en tiu vikia paĝo. La originalon kaj la tradukon oni povos eble meti al deponejo kiel Google Drive. Tiel almenaŭ kelkaj homoj povos legi la tekston; eĉ pli, se post la enmeto en tiujn lokojn oni diskonigos tion en diversaj retlistoj.

Tiel ni havos la eblecon kompreni, kion amaskomunikiloj siaflanke publikigas pri nia lingvo kaj kion ili akceptas de nia flanko. Kompreneble la paĝo estas nur aldono al la naciaj paĝoj pri amaskomunikilaj mencioj de Esperanto, kiuj ekzistas en pluraj landoj. Se konataj, ili estos ankaŭ menciitaj en la retejo de Esperanto en amaskomunikiloj.

Lu Wunsch-Rolshoven (Teksto iom redaktita kaj mallongigita)

IV PERSONOJ

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj

2 Fakrevuaj artikoloj

Kraus, Peter A. (2024). «Adieu à la diversité : comment la technocratie détermine la politique linguistique de l'Union européenne», franca. Tradukis Margaret Manale. En: *L'Homme & la Société* **2024 2 (221)**: *L'Union européenne : de l'intérêt génral aux conflits d'intérêts*. Redaktis Margaret Manale. 75–99. DOI: doi.org/10.3917/lhs.221.0075.

3 Libroj

Enguehard, Guillaume, Philippe Planchon kaj Alice Ray, redaktoroj (2025). *CrOCEVIA • La créativité linguistique au prisme des langues construites / Linguistic creativity through the lens of constructed languages*, angla kaj franca. *Ricognizioni – Rivista di Lingue e Letterature Straniere e Culture Moderne* **12**:23. Torino: Università degli Studi di Torino. URL: ojs.unito.it/index.php/ricognizioni/index.

Enhavo

Linguistic creativity through the lens of constructed languages. *Guillaume Enguehard, Alice Ray, Philippe Planchon*

Constraints on the art and craft of constructing languages: Lessons learnt from classic interlinguistics. *Federico Gobbo*

Technologie et créativité dans l'invention des langues: Étude sur l'utilisation des outils automatisés par les idéolinguistes. *Aurélie Nomblot, Izabella Thomas*

Notoriété des langues construites. *Pierre Dieumegard*

Language revival or language construction? A discussion in support of the normannique language revival. *Guillaume Enguehard*

Defining "naturalness": Constructed languages as typological exploration. *John Hutchinson*

Les nominaux auto-apécifiés en espéranto: Une approche typologique. *Maximilien Guérin*

Fonctionnement des affixes en espéranto d'un point de vue énonciatif. *Philippe Planchon*

Quenya is practically a main character: Elvish-English multilingualism in Tolkien-inspired fan-fictions. *Gloria Comandini, Francesco Dedè*

Translation of Personal Names in Klingon "Hamlet". *Chiara Meluzzi*

Sur l'intelligibilité d'une « langue crée » : L'alternance de langues dans l'oeuvre de paléo-fiction *Sous le vent du monde* de Pierre Pelot. *Mat Pires*

Plant Names in constructed worlds: Typological issues. *Alberto Ghia*

4 LIBROĈAPITROJ

5 REVU-NUMEROJ

5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

5.2 *Language Problems and Language Planning*

5.3 *Beletra Almanako*

5.4 *Esperantologio / Esperanto Studies*

5.5 *Investigationes Linguisticae*

6 NOVAĴLETEROJ

6.1 *Global coalition for language rights (GCLR)*

6.2 *Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)*

6.2.1 **La lettre d'information de l'OEP, 103, 2025-07/08.**

IpI estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.

Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.

Estraro de CED

Mark FETTES **(direktoro)** ♦ **Guilherme** FIANS ♦ **Klaus** SCHUBERT
Humphrey TONKIN ♦ **Michele** GAZZOLA.